

Bo Bergman,
La lasta stelo

tradukita de Magda Carlsson

Nuboj fermas mole
pordon de l' ĉiel'.
Tra la vitro sole
lumas unu stel'.

Baldaŭ Di' estingos
ankaŭ tiun for.
Nokto min atingos,
pezas mia kor'.

*Traduko de la Sveda poemo "Den sista stjärnan" de BO BERGMAN (*1869-10-06 – †1967-11-17) en Esperanton de MAGDA CARLSSON ((civila nomo: Magda Bohman), *1896 – †1971-09-07).*

Arg-492-959 (2009-05-16 09:11:41)

Pri la tradukintino Magda Carlsson vidu la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Magda_Bohman. En la libro "Sveda poemaro" de Magda Carlsson, kiun eldonis kaj aranĝis Frank Luin, troviĝas tiu poemo sur la paĝo 66. Vidu la retejon <http://i-espero.info/files/elibroj/o%20-%20carlsson,%20magda%20-%20sveda%20poemaro.pdf>.